

Resumo de la prelego de s-ro Hoŝida

(En la 15-a de agosto en Juĵno-Saĥalinsk, Saĥaleno)

Esperanto, lingvo internacia, proponita de varsovia okulisto L. L. Zamenhof en 1887 unue disvastiĝis tra la Rusa Imperio.

La unuan japan-lingvan lernolibron eldonis Verksto FUTABATEI Ŝimej laŭ originala ruslingva libro, kiun li ricevis de esperantisto en Vladivostok.

Zamenhof havis idealon, ke per Esperanto la homaro faros unu grandan rondon familian.

Esperanto estas la lingvo por amikeco trans limoj!

Por ni hokkajdanoj Saĥaleno estas najbara alilando kaj la plej proksima parto de Eŭropo. Tamen pro amara historio de milito kaj politikaj ĝenaĵoj ankoraŭ restas abismo inter niaj najbaraj insuloj, bedaŭrinde.

Ĉu vi iam aŭdis la nomon Esperanto, lingvo internacia proponita de varsovia okulisto L. L. Zamenhof en 1887? Ĉar tiam Varsovio estis parto de Rusa Imperio, Tiu lingvo unue disvastiĝis tra la vasta Rusa Imperio. La unua Esperanto-societo en Azio estis ne en Tokio, nek Pekino sed en Vladivostoko, 1891.

Esperanto venis al Japanio per kelkaj vojoj. La unuan japan-lingvan lernolibron eldonis Verksto FUTABATEI Ŝimej (HASEGAŬA Tacunosuke) laŭ originala ruslingva libro, kiun li ricevis de esperantisto en Vladivostok.

Zamenhof, la iniciatinto de la lingvo, havis idealon: Per tiu neŭtrala lingvo (Esperanto), komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian.

Sed kelkaj politikistoj(diktatoroj) konsideris tion danĝera por si kaj subpremis Esp-an movadon. Hitler, Stalin, kaj japana sekreta polico ĝis 1945...

Estas vero, ke oni multe uzas la anglan lingvon en internacia sfero, ĉefe en komercaj aferoj. Nia lingvo Esperanto estas unue la lingvo por amikeco trans limoj!